N-ro 178 MARTO 2004 (1)



# La Migranto

Naturamika Internacio
Esperanto Fako
TANEF

# La Migranto

*Ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj.*
*Eldonita kun aprobo kaj interkonsento de la Naturamikaj Internacio .*


Eldonanto TANEF
Apermonatoj
marto, junio, septembro, decembro.

Redaktofino
ĉiam la 1an de la antaŭa monato.

Naturamika internacio-NAI
Ĝen. Sekretario: Michael Proch'azka
Diefenbachgasse 36, A-1150 Wien,Aŭstria

Internacia fakreferanto :
Vakas.

**Ĉefredaktorino:** Antje Noordewier-Jagtonberg
Emmalaan 7, NL-3832 AH Leusden,Nederlando
Retadreso: bart.noordewier@12movo.nl

Redaktorino: Erna Döring
Klingelbergstr.11, CH-4056,Basel Svislando.

Redaktoro / Korektanto: Bert de Wit
Houtvaartkade 21, NL-2111 BR, Aerdenhout, Nederlando.
Retadreso: ajf.dewit@wanadoo.nl

La aŭtoroj mem respondecas.

Kasisto/abonanto-administracio :
Eric Baert, Rue des Taillis 23
BE-1420 Braine L'Alleud BELGIO.
ĝirkonto: n-ro 7543982 nome de "La Migranto"
Rue des Taillis 23, Braine L' Alleud BELGIO.
Rete : eric.baert@swing.be
Pagoj el eŭrolandoj sub mencio de Iban-nro :
Konto La Migranto NL 77 PSTB 0007543982
BIC:PSTBNL.21

UEA-konto tanf-a
Vi ne uzu la vorton "kotizo" aŭ"abono" sur via pagilo por eviti imposton. Se eble pagu al via landa peranto. La adreson vi trovas ĉiujare sur la koloraj paĝoj en la 4-a n-ro de La Migranto. Jarabono 10

Presisto:
Grammé, Amersfoort, Nederlando.

Ĉi tiu gazeto estas presita sur medioafabla papero sen kloro.


**Recivitaj gazetoj, revuoj, k.a.**

La Sago nro 0 – 1 – 2 – 3 (SAT-Amikaro)
Norvega Esperantisto 5 – 6/ 2003
Sennaciulo 1181 – 1182 – 1183 – 1184
SLEA Informilo 5/2003, 1/2004
La Internaciisto 1/2004
La Kancerkliniko 1/2004
La Krom-Kancerkliniko 18
Horizontaal 6/2003 – 1/2004
Indikoj por la institutoj de E.U. (ned.)
Esperanto La Verda Stelo '94 24
Eŭropa por vi. Loĝi, labori kaj studi en alia lando. Eld.E.U. nederl.lingve.
Internacia Fervojisto 1/2004
Esperanto UEA 1165 – 1166 – 1167

**Enhavo:**


La adiaŭo, donacoj 3
Nova kasisto 4
Tanef. Antaŭkongreso de SAT 5,6
Energio por ĉiam? 7
Ventmueliloj, diversaj komunikoj 8
Memoro pri Marinjo A. 9
Respekto kaj helpo 10
La malgranda ansero, komunikoj 11,12
Esperanto en la Uragano de Ideologioj. 13
Konatiĝo kun polaj Naturamikaj Domoj 14 15,16


**La frontpaĝo parolas por si mem:**

PRINTEMPO!

## La adiaŭo.



La ĝojiga kumuniko ke anoncis sin nova kasisto por TANEF, havas dorsan flankon: ni devas adiaŭi nian nunan kasistinon. Ŝi estis por multaj malnova konatulo. Kun edzo kaj la du filinoj ili formis dum multaj jaroj aktivan esperanto-familion. Aad estis en la pasinteco la librotenistino por la nederlanda asocio "Fidu la estontecon", administriis la monon por du SAT-Kongresoj en Nederlando, prizorgis la membroadministradon por FLE kaj poste por "Esperanto Nederland". Kiam ŝi ĉion transdonis al posteuloj, ĉar ankaŭ tiam (1996) ĝenis doloro pro reŭmatismo, mi petis ŝin transpreni la financan laboron por TANEF. Estis pli malfacile enkasigi monon en la tiama Eŭropo ol en la eŭrotempo nun. Energie ŝi ordigis kaj zorgis pri klaraj interkonsentoj kun la perantoj en "nepagipovaj landoj" kaj tio alportis por ŝi ofte sendormaj noktoj, ĉar ŝi ne estas facila por si mem. Ne ĉio sukcesis, la rusa peranto neniam respondis, foje la mono estas tute ne enspezita.

Nun ĉe la transdono de la kaso al Eric Baert, la financa stato de TANEF estas sana.

Aad, dankon por via persistema laborforto kiun vi malavare donis al nia movado. Dankon al edzo Bertus por la veturo al necesaj kunvenoj kaj la patienca atendo.

Bondezirojn kaj sanon por vi ambaŭ!

Nome el ni ĉiuj, Antje N.

## Donacoj.


Kun ĝojo mi povas informi vin pri jenaj ricevitaj donacoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Nederlando:** | | | |
| | N.N. | | 16,80 |
| | B.de Wit 2004 | | 220,00 |
| | A.ter Braak | | 15,00 |
| | W.v.d.Blink | | 2,50 |
| | C.L.Dekker | | 2,50 |
| | J.van Hulst | | 5,00 |
| | M.Kokkedee | | 2,00 |
| | M.Maatman | | 5,00 |
| | J.W.Quispel | | 2,50 |
| | L.Staghouwer | | 5,00 |
| | N.Vollegraaf | | 2,00 |
| **Belgio**: | | | |
| | N.N. | | 20,00 |
| | M.Dewit | | 2,00 |
| J.Schram (solidarece) | | | 10,00 |
| **Svislando:** | | | |
| | G.Eggenberger | SFr | 2,50 |
| | A.Fiechter | SFr | 2,50 |
| | C.Gacond | SFr | 2,50 |
| | H.Gerhard | SFr | 2,50 |
| | G.Keller | SFr | 0,50 |
| | A.Kessler | SFr | 7,50 |
| | H.Macher | SFr | 7,50 |
| | E.Rohner | SFr | 7,50 |

Ni elkore dankas niajn donacintojn !

A.Demmendaal.

## Nova kasisto.



La alvoko por nova kasisto post la informo de la nuna kasistino Aad Demmendaal en la jarkunveno kaj la decembra numero 2003 de La Migranto, ke ŝi pro sia sanstato ne plu povos plenumi tiun taskon, havis sukceson.
Erik Baert el Belgio deklaris sin preta transpreni la kasistan laboron.
Li dum multaj jaroj estas aktiva membro de la Naturamika Asocio en sia lando kaj abonanto de La Migranto. Kelkaj el vi renkontis lin dum i.a. naturamika feria semajno, La Chaux-de-Fonds 1993.

La ĝirkonto por pagi al Erik ekde la unua de aprilo 2004 restas la sama ol tiu kiun uzis Aad sed nun kun mencio de la adreso de Eric.(vidu paĝon 2) El landoj, kiuj havas kiel moneron la eŭron, la perantoj aŭ abonantoj povas sen kostoj rekte pagi al Eric, do ne plu al UEA, sed tiam nepre devas surskribi la iban-numeron.
Ĉi sube Eric prezentas sin al vi :

**Vivo.**
Mi laboris por diversaj firmaoj aktivaj en la produktado kaj transporto de energio (elektro, gaso) en pluraj landoj kaj emeritiĝis en la jaro 1999a.
Ĉar la laboro estis ege streĉa, necesas sportumi. En 1974 ni biciklis kun familianoj kaj amikoj tra Nederlando, kie ni malkovris la Naturamikajn Domojn. Tiel reveninte mi aliĝis la naturamikan asocion en la apuda urbo Nivelles (Belgio) ekde 1976. En tiu grupo mi renkontis samideanon Robert Delhaye ; sekve mi eklernis Esperanton en 1990, partoprenis en la ferio-semajno en La Chaux-de-Fonds kaj en kelkaj kongresoj, skribas nun artikolojn por naturamikaj bultenoj.
Min interesas la problemoj de energio kaj tutmondiĝo.
Por helpi la movadon, mi transprenos la taskon de kasisto ; ne estante librotenisto mi pardonpetas por la eraroj kiujn mi faros ! Leginte financajn raportojn, mi ofte miris pri la belaj vicoj de ciferoj kies sumo ĉiam kongruis kaj mi opiniis ke tio estas la rezulto de iu ruzo de librotenisto.
Mi pristudis la dokumentojn ricevitajn de Aad kaj mi sekvos tiun modelon. Mi dankesprimas ŝin pro la multaj klarigoj ŝi donis kaj antaŭdankas ŝin por la konsiloj kiujn mi certe bezonos !
Eric Baert.

# TANEF. Antaŭkongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) Grindelwald: 5 – 12/7/2003.

Trajne mi veturis la 5an de julio 2003a de Antverpeno al Bruselo, de tie rekte al Bern kaj tiam ĝis Interlaken. Tie sur la kajo mi renkontis Galina Belenjuk el Sochi (RU) kun kiu mi en iu antaŭa kongreso jam foje ĉambris. Kune ni pluenveturis ĝis Grindelwald. Tien nin atendis Anjo Amika, unu de la kunorganizantoj de la SAT-Kongreso. Treninte mian valizon malantaŭ ŝi, suprengrimpinte la sufiĉe krudan promenvojon de iom pli ol 15 minutoj, ŝi akompanis nin al la Naturamika Domo je 1150m. mirinde situita vid' al vide de la Wetterhorn kaj kun optimuma ekipaĵo.

Pro la neatendita nuligo de la anoncita jarkunveno de TANEF, nia grupo fine konsistis nur el 13 partoprenantoj, tamen el 8 landoj : Belgio. Francio, Britio, Hungario, Italio, Litovio, Malagasio kaj Rusio. Kelkaj zorgis mem por sia manĝaĵo sed la plej multaj ĝuis la pli ol riĉan matenmanĝan tablon kaj la bongustajn menuojn, kiuj povis rivali kun tiuj de unurangaj restoracioj.

La unua kaj ankaŭ postaj vesperoj Anjo Amiko nin regalis antaŭ la vespermanĝo per serio de belegaj kantoj. Ĉiuj tagoj post la vespermanĝo kaj ree post la matenmanĝo, pro eventualaj veterŝanĝoj, la organizanto, profesoro François Degoul, priparolis kun la grupo la ekskursojn.
Tiele ni unue surgrimpis la lignajn ŝtupojn kun vido sur la « Malsupera glaĉero », fascinitaj per la abismo de unu kilometro, pli ol 100m. profunda, kien surpentumis la monta rivero de la Supro ; ni piknikis en kvieta valo kaj vizitis la Glacigroton kaj ĝian muzeon. La postan tagon ni prenis la telferon al First kaj tra la sunbanita pejzaĝo ni marŝis laŭ la alpaj herbejoj, plenaj je floroj al Bachalp, kie du lagoj kuniĝas kaj ni la buterpanojn manĝis. Kelkaj iris ankoraŭ pli supren sed mi preferis trankvile ekrepromeni. Tiel trankvile tio tamen ne okazis ĉar je iu momento mi konstatis ke mankis al mi la monujo ; konfuzego kompreneble ! Sed finfine tute nenecese ĉar ĝi tutsimple postrestis en la Naturamika Domo. Honto !

Ĉar marde mi jam sentis du grimp- kaj promenvojojn en la kruroj, mi pli ŝatis kune kun Lajla, origina el Alĝerio, sed nun vivanta en Francio, viziti Grindelwald. Dum la gvidita vizito al la vilaĝkerno, al la preĝejo kun tombejo kie ripozas tiom da pereintaj montgvidistoj kaj al la regiona muzeo k.t.p. ni jam multe eksciis pri la evoluo de Grindelwald.
Per aŭto ni ankaŭ veturis al la Trümmelbach, kie 10 glaĉeraj akvofaloj ene de la monto per


tunellifto fariĝas alireblaj kaj lumigitaj. La Trümmelbach mem kaptas la akvon de la gigantaj glaĉervandoj de la Eiger (3970m), Mönch (4099m), kaj Jungfrau (4156m), kaj transportas jare 20200 tunojn da pecigitaj ŝtonoj kaj ŝlimoj el ĝia fluejo de 24 km. kiu duone estas kovrita de glaĉeroj kaj neĝo; ĝis 20.000 litroj da akvo en sekundo, surdigega, ŝaumanta kaj kirlanta spektaklo, mondnatura heredaĵo de UNESCO.
Tiuj kiuj intencis viziti la Jungfrauloch kaj aneksojn devis tion unu tagon prokrasti ĉar ĝuste la planita tago estis iom nebula. Poste ili tion ne bedaŭris sed estis entuziasmegaj pri sia ekskurso. Cetere estis verŝajne ke ili estis inter la lastaj kiuj ankoraŭ vidis la glaĉeron antaŭ ol pecon de ĝi forfalis pro la escepte varmega vetero, kiel vi eble legis.
Mi mem ne trudis min sur la glacineĝon sed kun du akompanantinoj ni veturis aŭtobuŝe ĝis alteco de 1695m. kaj tie faris grandegan promenadon je nia propra rapideco.
Kune kun Galina mi ankaŭ pasigis belegan tagon en Interlaken, pasumis tra la mondumaj stratoj kaj butikoj kaj al la kvieta pitoreska vojo al Untersee kun ĝia tipa preĝejo kaj florumita placo, por pluenvagi al la Thunerlago kun ĝia tiel festa, gaja drakoŝipo.

Alia gaja noto en tiu turisma semajno ni spertis sekve al iniciato de la komercistoj.
Somere oni nome festas merkredvesp ere per i.a. speco de festa baza o, sportaj allogaĵoj, muziko de diversaj orkestretoj kaj solistoj ; kaj oni dancas ! Ĉefe tio returnigis diversajn inter ni en la valon por amuziĝi.
Sed kelkfoje ni ankaŭ serioze laboris ; tiel Justine Ralalarisoa prelegis al ni pri la edukado kaj instruo en sia lando, Malagasio, kaj ŝi klarigis la malfacilaĵojn kun kiu oni tie baraktas.

Escepte de tri partoprenantoj al la antaŭkongreso, ĉiuj ceteraj sabaton matene forveturis al la SAT-Kongreso en La Chaux-de-Fonds. Por ebligi al Peter Miles iom komforte vojaĝi malgraŭ la serioza neuralgio, ekkaptinta lin, Galina kaj mi vojaĝis trajne dum la aŭtoj kunprenis niajn valizojn. Tiel ankaŭ ni tute nelacaj alvenis je la destino.


Kaj.....ĝis iu sekvonta antaŭ-(povas ankaŭ esti post-)Kongreso ! Kiuj povas organizi tion ?

Stella de Weerd, Belgio.



*Grindelwald*

## Energio por ĉiam?



Nuntempe en multaj landoj la ekologoj batalas por anstataŭi la nukleajn atomcentralojn per ventenergiaj generatoroj. Tamen oni devas pripensi ke la potenco de unu generatoro en atomcentralo produktas 1000 MW (mil milionojn de Watt) kaj la potenco de unu ventenergia generatoro atingas ĉirkaŭ 2 MW; do oni bezonas 500 ventenergiajn generatorojn por anstataŭi unu generatoron de atomcentralo. Sed tiuj povas esti starigitaj en diversaj lokoj de la lando ĉar ili ne bezonas riveron por la funkciado de la turbinoj.

Jes, la nukleaj rubaĵoj kunportas gravan problemon por la medio sed la atomcentraloj ne produktas varmigantajn gasojn, kontrastante kun la centraloj funkciantaj per karbo, oleo aŭ gaso.
En la nunaj atomcentraloj la neŭtronoj frakasas la kernon (1) de pezaj elementoj de la « Sistemo de Mendeleev » i.a. uranion riĉigitan 235 , en du pli malpezan elementojn (meze 46 protonoj), diversajn aliajn radioaktivajn materialojn kaj malvarmecon. Tiu procezo nomiĝas fuzio. En la centraloj tiu procezo estas kontrolita ; en la atombomboj A tiu procezo estas tute liberigita.

De multaj jaroj oni serĉas pli "puran" sistemon por la uzado de la plej malpeza elemento de la Sistemo de Mendeleev : hidrogenon ! Ekzemple : per la kunigo de du izotopoj (2) de hidrogeno oni ekhavas nedanĝerajn rubaĵojn kaj grandegan energion. Sed tiu kunigo devas okazi en varmega medio : la temperaturo estas tiel alta ke neniu materialo povas elteni ĝin. Do per potencaj magnetoj oni povas gvidi la varmegajn izotopojn. En la maro troviĝas senfina kvanto da tiuj izotopoj. De multaj jaroj ekzistas kelkaj eksperimentaj instalaĵoj i.a. en Culham (Britio) kaj en Ruslando. Nun oni intencas konstrui pli grandskalan instalaĵon en Cadarache (Francio) aŭ en Azio. Tiu procezo (fuzio) estas ĉe la atombombo H, iniciata per la varmeco de la atombombo A.
1.atomkerno : la centra parto de atomo enhavas protonojn kaj neŭtronojn.
2.izotopo : kemiaj elementoj, kies nukleoj havas egalan elektran ŝargon, sed diferencajn masojn ; ili havas la samajn kemiajn ecojn kaj troviĝas tial sur la sama loko en la periodia sistemo de Mendeleev. (Laŭ PIV)
Eric Baert.

## Ventmueliloj en La Norda Maro

ANP (nederlanda novaĵagentejo publicis en januaro 2004 : je 25 km de la marbordo ĉe IJmuiden venos ventmueliloparko de 60 turbinoj. La parko, kiu situos en akvo-profundo de 20 ĝis 25 metroj funkcios la sekvontan jaron. La projekto plenumas gravajn medio-postulojn ; i.a.libera elvido ekde la strando kaj ekstere de la birdmigradvojoj.

La turbinoj ĉiuj havas kapaciton de du megavatoj, jare la parko liveros sufiĉe da energio por 142 mastrumaĵoj. La organizo "Green peace" kaj la fondaĵo "Norda Maro" ĝojas pri la nova energia parko. La nederlanda registraro intencas realigi en la jaro 2020 ventmuelilojn kun komuna kapablo de 60 000 megavatoj, elirante de la hodiaŭa maksimuma kapablo de la mueliloj.

Freŝdata esploro de la universitatoj en Utreĥto kaj Wageningen enhavas bonan novaĵon por la marbordaj lokoj. La ĉeesto de ventmueliloparko malpliiĝos la pluveblecojn en la marbordaj regionoj. La turbinoj zorgas pri pli seka aero, pro kio falos malpli da pluvo !

A.N.

## Diversaj komunikoj

En la adresaro de la decembra numero, la banko-konto de nia peranto en Hispanio ne estis ĝusta. Luis Serrano Pèrez, banko de Sabadell : 0081 0900 82 0006712480.

Li ankaŭ invitas vin al **la 12-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo,** 2 – 9 de oktobro 2004 en Salou (Tarragona) Hispanio. Pliajn informojn ĉe : Luis Serrano de Pèrez, Apartat 432, 08200-Sabadell, Hispanio.
Tel. (+34)937314111.
Rete :luis-serrano@mixmail.com

**La 59-a SAT-Amikara Kongreso** en La Roche-sur-Yon okazos 10-14 aprilo 2004. Organizanta asocio : Espéranto-Vendée-Le Grand, Renaudon FR-85540 Moutiers Les Mauxfaits. Francio.
Tel. + Faksilo : (33) 0251314850.
Rete: espero.hm@club-internet,fr
La organo de SAT-Amikaro ŝanĝis la aspekton kaj la nomo fariĝis "La SAGO".

**56-IFEF-Kongreso: Internacia Fervojista Esperanto Federacio** en Sopron, Hungario,8 – 15 majo
Inf.: Alfonz Moró, Olga u.3 HU-7632 Pécs, Hungario. Rete:
ifk56@freemail.hu

**SATEB, Jarkonferenco 2004**



14-16.05.2004
Kontaktu :
Wedgwood Memorial College, Station Road Barlaston. Stoke on Trent, ST129DG.
Rete: Wedgwood.college@staffordshire.gov.uk



## Memoro pri Marinjo A.

En tiu tag' sub blua lun' septembre
ĉe juna pruna arbo en komfort'
mi tenis ŝin, la palan mutan karan,
kaj kiel ŝonĝon, en la brak'sen vort'.
Kaj super ni somere en ĉielo
mi vidis nubon longe kun fervor'.
Ĝi estis blanka, nekredeble alta.
Ĉe l' rerigardo ĝi jam estis for.

De tiu tago pasis multaj lunoj,
kaj nuboj naĝis multaj en la vent'.
La prunaj arboj eble ne plu staras,
kaj pro l'demand' pri mia amkontent' :
mi diras nun, mi tute ne memoras,
amik' sed vin komprenas kun konsent'.
Vizaĝo ŝia tamen tiom foras.
Mi scias nur, mi kisis ŝin kun sent'.

Kaj eĉ la kiŝ', ĝi estus forgesita,
Se ne estintus tie tiu nub'.
Mi scias ĝin kaj ĉiam ĝin mi scios.
Ĝi ege blankis en la alt', sen dub'.
La prunaj arboj eble eĉ plu floras.
Ĉu sepa id' de l'in' jus krias en la fru' ?
Sed tiu nubo floris nur minutojn,
ĉe l' rerigardo svenis jam en blu'.

Bertolt Brecht.

Tradukis Cezar.

## RESPEKTO KAJ HELPO EN LA NUNA SOCIO

Antaŭ iom da tempo aperis libro de Richard Sennet pri "Respekto en epoko de sociala malegaleco". Legante la recenzon, oni ekhavas la ideon ke temas pri unu el tiuj libroj kiuj fine vortigas kio estas flarata kaj vidata de ĉiuj en sia ĉirkaŭaĵo, sed kion oni ĝis tiam ankoraŭ ne priskribis.

La kerno de la ideoj de la verkisto estas ke la nuntempa reganta ideologio emfazas ke nur tiu kiu estas sukcesa, meritas respekton. Respekto estas agnosko de tio kion oni faras aŭ de tio kio oni estas. Homoj kiuj ne dependas de aliaj homoj fakte estas la idealo, la plej alta formo de libereco. La sukcesplena entreprenisto estas la modelo.

Kiu estas helpobezona, estas duaranga persono. La malriĉuloj estas senmerita klaso. Oni « helpas » ilin, sed ne kalkulas pri la sentoj de la helpataj personoj. Socialaj servoj havas kiel plej altan celon ne helpadon de klientoj trovi laboron, sed kontroladon ĉu ili ne fraŭdas. Oni kredas ke ĉiu kiu ricevas socialan subtenon estas principe fraŭdanto.

Novliberaluloj kontraŭas regulojn, sed aliflanke ili submetas ĉion al sufoka kontrola sistemo de efikeco. Principe oni malfidas la profesiulojn en la socialaj servoj kaj instruado. Helpantoj en socialaj servoj, en la sanprizorgado kaj en la instruado estas devigataj sekvi sistemon kiu havas efikecon kiel plej altan normon. Ne plu la individua helpopetanto estas la deirpunkto, sed la raciigita zorgosistemo, plena de kontrolantaj manaĝeroj.

En la internacia politiko oni vidas similan rilaton inter Usonaj politikistoj kaj Iraka loĝantaro. Bush kaj liaj kunuloj opiniis ke la irakanoj akceptos la usonanajn armeanojn kiel liberigantojn. Anstataŭ dankemon ili nun tamen ricevas grenadojn kaj raketojn. Neniam ili sin demandis kial homoj el islamaj landoj tiom malamas Usonanojn. Helpo en la nuna socio estas aŭ konsiderata kiel dresado (laŭ normoj de la regantoj) aŭ kiel amsufokado. Meza vojo, en kiu oni helpas homojn helpi sin mem, tamen estas plej taŭga, sed plej malfacile efektivigebla.

Instruado, kiom ajn oni provas standardigi ĝin, ne estas komparebla al fabrikado de aùtomobilo. Same oni povas diri pri sanprizorgado. Pli da libereco por la profesiaj helpantoj kaj instruistoj tamen estas malfacile akirebla kaj realigebla en ĉi tiu socio kiu estas plena de rezultatrespondeco kaj efikeco laŭ merkatreguloj.

Sennet opinias ke oni nur en respekto al la propreco de aliaj homoj, utiligante iliajn sciojn kaj kapablojn, oni povas vere helpi. Oni respektu aliajn personojn, tiel ke ili povu regajni sian memrespekton. *(Laŭ artikolo en "De Volkskrant"2003-05-10),*B.de Wit.

## La malgranda Ansero.

Inter miloj da blankfruntaj anseroj *(Anser albifrons)* montriĝas kelkfoje ke estas kelkaj kiuj havas iom malsimilan kapon. Iom pli rondan, iom pli platan kaj kun atentokapta okulo kiun ĉirkaŭas ora ringeto. Tiuj ĉi ne estas blankfruntaj anseroj, sed malgrandaj anseroj (*Anser erythropus)* .



*Foto Birdo- laborgrupo Zuidlaren*

La malgranda ansero estas la plej rara ansero en Nederlando kaj unu el la plej raraj kovobirdoj de Eŭropo. Dank'al kelkaj birdobservantoj en Frislando antaŭ dudek jaroj, oni povis fari en 2003 belan libron pri ĉi tiu malgranda ansero.

La malgranda ansero plej facile rekoneblas per sia ora ringo ĉirkaŭ la okulo. Ĝia nomo ne devenas el tio, Erythropus nome signifas « ruĝkrura » . Sed en la frisa lingvo ĝia nomo ja referencas al tiu ringumita okulo « Goudeachje ». La malgranda ansero mezuras maksimume 66 cm-ojn kaj estas malpli granda ol la blankfrunta ansero. La birdogvidiloj skribas ke ĝi moviĝas pli rapide. La malgranda ansero vokas per alttona « *ĝi-ie* ».

Ĉiun vintron la malgrandaj anseroj venas el Laponio al la nordamaraj regionoj. En Nederlando ili venas al la Laŭers-lago, la Ejselmer-regiono, Sud-Holando kaj Zelando. La kelkcentoj kiuj vizitas Nederlandon en vintro akre kontrastas kun la centmiloj da alispeciaj anseroj kiuj ĉiujare alteriĝas sur la herbejoj. Ekze. 300 mil blankvangaj anseroj *(Branta leucopsis)* kaj 125 mil grizaj anseroj *(Anser anser).*

Iam la malgranda ansero estis multe pli abunda, sed de la sesdekaj jaroj la nombroj malpliiĝis. Kialo: La migra konduto de la besto. Ĉar krom laŭlonge la okcidenta marbordo de Eŭropo ĝi ankaŭ migras al Bulgario kaj Rumanio por travintri. Kaj tie oni tiom ĉasis ilin, ke en la okdekaj jaroj birdoprotektantoj decidis ion entrepreni.

Koncize dirite : ili manipulis la migran vojon de la malgrandaj anseroj okcidenten. Por tio ili utiligis la blankvangan anseron, kiu ankaŭ kovas en Svedio, sed kontraŭe al la malgranda ansero migras al Nederlando.

Ovojn de malgrandaj anseroj oni metis en nestojn de blankvangaj anseroj. Tio tamen ne estis tiom facile, ĉar la blankvangaj anseroj kovas pli norde ol la malgrandaj

anseroj. Kiam plenkreskaj, la malgrandaj anseroj flugis kun siaj blankvangaj adoptgepatroj al Nederlando. La instinkto sekve preskribas ke ili reiras al la originala regiono de la malgrandaj anseroj en Svedio.
Ili kaj iliaj idoj denun ĉiujare iras al Nederlando kaj la malgranda ansero prosperas pli kaj pli. Oni ĉiam pli da ili observas en Frislando. Antaŭ nelonge aperis libro pri la saviga entrepreno de la malgrandaj anseroj en Frislando. Ĝin eldonis la KNNV, La Reĝa Nederlanda Naturhistoria Asocio en Utreĥto. Esp. B.de Wit.

## Diversaj komunikoj:

Multjaroj Erna Döring estis la akso ĉirkaŭ kiu ĉio en la laboro por Tanef kaj LM. turniĝis. Bedaŭrinde mi devas komuniki ke ŝi ne fartas bone. Bonvolu sendi al ŝi bildkarton por ke ŝi mense el la domo vojaĝu kiel antaŭe. La adreso:Klingelbergstr. 11, CH-4056 , Basel Svislando.
Koran dankon ! A.N.

**Kiu estos la nova perant(in)o por Nederlando?**

Ĝis nun neniu anoncis sin por enkasigi la abonkostojn en Nederlando. Pro la forpaso de Gerard van der Horst, provizore transprenis Aad Demmendaal tion taskon. Ne estas multe da laboro, certe ne se ĉiuj tuj pagu. Bonvolu anonci vin ĉe Aad Demmendaal, Boekenrode 11, 3085 JA Rotterdam. Rete: A.M.Demmendaal@planet.nl


**Du gravaj mondaj Esperanto-Kongresoj, 2004.**

La 89-a Universala Kongreso en Pekino, Ĉinio de la 24 ĝis 31-a de julio. Informoj kaj aliĝoj: UEA-Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,Nederlando. Tel.(+31) 104361044.
Rete:**uea@inter.nl.net**
TTT:**http://www.uea.org**

La 77-a SAT-Kongreso Bratislava en Slovakio de la 14 ĝis 21-a de aŭgusto.
Koresponda adreso: KAVA PECH, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice Ĉeĥio. Tel.: + 420 257712201 Rete **info@kava-pech.cz;http://www.kava.pech.cz**
La OKK konsistas el Petro Chrdle, Zdenek Pluhar, Jana Melicharkova, J. Rechtorysova.
La 77-a SAT-Kongreso okazos unuan fojon en Slovakio, precize en ĝia ĉefurbo Bratislava, kiu logas kaj pro sia beleca urba, kaj pro la konekto kun bela naturo: la rivero Danubo, montareto Malgrandaj Karpatoj. Kiel kongresejo servos La Kultura Domo Trnavka en la samnoma urboparto de Bratislava kaj parte ankaŭ la apuda hotelo Plus.
Ĝis 30.04.04 rabataj prezoj por la kongreskotizoj.
Sennaciulo decembro 2003.

## Esperanto en la Uragano de Ideologioj.

Internacia Esperanto-Simpozio *en la Aŭstria Nacia Biblioteko*



La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun UEA organizos simpozion okaze de du gravaj Esperanto-jubileoj : la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904-1942) kaj la 75-a jariĝo de la Internacia Esperanto Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko depost 1929) en Vieno.

Prelegos Ulrich Lins,(Germanio/-Japanio), Vilmos Benczik (Hungario),Vera kaj Detlev Blanke(Ger) Heiner Eichner (Vieno), Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM), Claude Piron (Svislando).

La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de E. signifas verki kadre de la mondhistorio. *Tion montris Ulrich Lins per* la libro "La danĝera Lingvo". Studo pri la persekutoj kontraŭ E. Ĝi do ne estas io ekzotika kaj marĝena, kiel foje opinias la ĝenerala *publiko*, sed ĝi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktos la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante i.a. la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof, murdita en 1942 en la koncentrejo Treblinka kaj de IEM, fermita en 1938 fare de nazioj. Apud tio pripraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon. Kia estas hodiaŭ *la* situacio de E. en *la* mondo ? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj ?Kiel kondutu la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en *la* publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn ?

La unuan duontagon estos la laborlingvo la germana por ne-esperanto publiko ; la cetero disvolviĝos en Esperanto. Paralele okazos : malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la IEM, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia **Czeh-kurso por komencantoj !** Partoprenkotizo : $50^E$, por studentoj kaj lernantoj $35^E$. Aliĝo: Internacia Esperanto-Muzeo, Christian Cimpa, Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 Vieno, Aŭstrio. Rete:plansprachen@onb.ac.at Christian Cimpa.


**Kongreso 2004 de l'Espéranto en France,** La Roque 19 – 24 de majo 2004. Informoj : Espéranto-France, 4bis Rue de la Cerisaie, Fr-75004 Parizo, Francio. Rete : info@esperanto-france.org

## Konatiĝo kun Polaj Naturamikaj Domoj.

En 2002 oficiale membriĝis la organizo de polaj naturamikoj, la PTTK, la internacian naturamikan federacion NAJ en Vieno. La pola PTTK signifas "Pola Turisma kaj Naturamika Asocio" kaj estis fondita en la jaro 1950 per kunligo de du pli maljunaj organizoj, do jam havis longan historion.
Pro tio la eŭropaj Naturamikoj subite povis elekti inter 145 naturamikaj domoj kaj 40 kampadejoj por restadi en Pollando. Ĉiajn informojn pri ĝi vi trovu en la pola gvidlibro, aĉetebla ĉe via landa naturamika movado en la angla aŭ germana lingvo (kiam en Esperanto ?) En pli ol la duono de la polaj domoj, vi ricevos rabaton de 20% je la tranoktprezo, se vi montru vian landan membrokarton. La manĝoj estas por la okcidentanoj tiom malmultekostaj ke memkuiro nevaloras la penon kaj krome mankas la kuirejoj por memkuirado. La gastoj ankaŭ ne devas helpi kun la purigado de la domo kiel en diversaj aliaj landoj estas kutime.

Pollando estas nur iomete malpli vasta ol Germanio sed havas malpli ol la duonon da enloĝantoj : 40 milionojn. Esperanto estu urĝe necesa ĉar tre malmulte da enloĝantoj komprenas kaj parolas fremdan lingvon kaj la pola estas por okcidentaj eŭropanoj ege malfacila.
En la lando situas 22 ŝirmataj Naciaj Parkoj kaj ĉirkaŭ 700 malgrandaj rezervatoj. Kvankam multaj homoj estas senlaboraj, oni faras ĉion por gardi la belegan naturon en la lando.
La pola naturamika asocio estas tre forta kaj granda kaj posedas diversajn regionajn oficejojn. Ĝi havas ankaŭ komercajn entreprenojn kiel specialajn libro-butikojn kaj busliniojn en naturregionoj. Unikaĵo por la polaj Naturamikoj estas la propraj maneĝoj, kiuj organizas rajdlernadon kaj rajdekskursojn tra la montaro.

## Bicikle laŭlonge de polaj Naturamikaj Domoj.



Peter van der Loos, nederlanda naturamiko kaj membro de la laborgrupo "feria konsilanta oficejo de la nederlanda naturamika asocio NIVON", esplorrigardis bicikle diversajn polajn domojn. Trajne li iris al la orient-germana Görlitz, urbeto situanta

ĉe la rivero "Neisse". Aliflanke de ĉi tiu rivero, la urbo nomiĝas Zgorzelec. Peter rakontas : Mi komence veturas preter malplenaj grandegaj barakoj kaj ĉesigitaj fabrikoj, ŝtataj entreprenoj en la komunista pasinteco. Mi haltas ĉe belegaj preĝejoj kaj aliaj kulturmonumentoj kaj biciklas tra dormantaj urbetoj, kiuj estis longtempe germanaj, aŭstriaj aŭ ukrajnaj. En ĉiu vilaĝo mi vidas etajn spicisto-butikojn kaj ofte grupon da senlaboruloj sur la stratoj. Multaj homoj devas travivi per malmulte da mono. Sed la nova kapitalismo allogas : grandega reklamtabulo estas plantita en malgranda ĝardeno ; fortikaj buboj en Zakopane kun bravuro rondiradas sur risortaj superbicikloj. Kontraste mi vidas pli orienten lignosegilon, pulsatan per akvoforto, kie la ĉarpentisto elektas uzeblan arbotrunkon.

Antaŭ ol mi estos en la sud-oriento, mi biciklas tra la iomete senkreskaĵan Karkonoszemontaro (montaro de gigantoj) al la naturamikaj domoj el la domgvidilo. Ili situas en belegaj lokoj, sed estas luktado por atingi ĝin, superkrutaj vojetoj aŭ malebenaj. Malpermesate por aŭtoj, sed la finfina rekompenco estas: afabla bonvenigo, varma duŝo en ligna kabano kaj bongusta manĝo. Mi estas en Samotnia. Samaj melodiaj nomoj mi renkontos pli ofte sur mia vojo : Zawoja, Hala Kondra-towa, Spalona, Kalatówki. Ne nur suprizaj estas la nomoj, ankaŭ la domoj mem estas tre diversaj : foje la gastoj dormas en propraj dormsakoj sur malmolaj lignaj litoj, morgaŭ mi vidas supermolajn kun blankaj littukoj. Hodiaŭ mi ricevas manĝon tra luketon el simpla kuierejo, alifoje en manĝejo kun menukarto kaj servistino. Kompreneble ankaŭ la prezoj varias. De simpla tranoktejo por 4,- ĝis 12.- eŭroj po persono en du-personaj ĉambro kaj en la grandaj urboj eĉ pli. Plej ofte la sanitara instalaĵo estas jam modernigita sed la prizorgo de la domo postrestis kaj la litoj estas malmolaj.



La lastajn tagojn de mia bicikla vojaĝo tra Pollando mi veturas tra la Tatra-Montaron kaj promenas al kelkaj kabanoj de la Naturamikoj. La plej alta pinto tie estas la Rysy (2499m.). En tiu Nacia Parko loĝas la reĝa aglo, ĉamoj kaj linkoj, kelkfoje oni vidas urson. Mi biciklas plu al la oriento tra monteta regiono de la Podhale kaj atingas la interne belege pitoreskan lignan preĝejeton en la vilaĝo Debno.



*La naturamika domo Dolina Roztoki*

La sinjoro paroĥestro ankoraŭ havas sieston do mi devas atendi horeton ĝis li montros la trezoron al vizitantoj. Laŭlonge de kasteloj kaj tra sufiĉe bonaj kaj kvietaj vojoj mi biciklas al la montoj de la Beskiden, kie la rivero Dunajec serpentume akrigis trairejon en la kretrokojn. Ĉe ĉi tiu impona loko du stiristoj kun floso de du kunligitaj lignaj ŝipetoj prenas min kaj mian biciklon kaj pere de ilia navigacia lerteco ni malsuprenglitas la riveron. Tiel mi preterpasas du belegajn kaj bon situantajn naturamikajn domojn : Trzy Korony kaj Orlica. Loko por pli longa restado sed laŭ la programo mi iros nun al la urbo Krakovo, laŭdire la plej bela urbo de Pollando. Tie mi tranoktados proksime de la malnova kvartalo en alia pola fenomeno : la luksa naturamika hotelo Wysplianski.
Peter van der Loos, VAB Nivon dec. 2003. Trad. A.N.

---

## Eŭropo apude.

En la dec. n-ro 2003 de L.M. estis anonco pri semajnfino kun informtago. Bedaŭrinde estas nun ankoraŭ dubinde ĉu la tuto povos okazi. Estas ne certe ĉu la diversaj kontaktoj kun la kunlaborantoj hejme el la Naturamika Domo "Koos Vorrinkhuis" estas eblaj. La kunorganizanto de Nivon volas utiligi la teknikajn servajn de iu firmao sed tio kostos multe.
Ĝis nun Bert ne ricevis multe da reagoj. Je la duono de marto estos klare ĉu entute la semajnfino okazos. Interesiĝantoj bonvolu skribi aŭ rete informi ĉe Bert de Wit. Retadreso: ajf.de wit@wanadoo.nl